



**4(182)
2021**

Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

Bultenon redaktas: ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,
Adreso por korespondi: str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Adam Zagajewski

tradukis Lidia Ligęza

Obudź się

Obudź się moja duszo.
Nie wiem, gdzie jesteś,
gdzie się ukryłaś,
ale proszę cię, obudź się,
jeszcze jesteście razem,
jeszcze droga przed nami,
naszą gwiazdą będzie
jasny rąbek świtu.



Vekiĝu

Vekiĝu, mia animo.
Mi ne scias, kie vi estas,
kie vi kaŝiĝis,
sed mi vin petas, vekiĝu;
ankoraŭ ni estas kune,
ankoraŭ la vojo antaŭ ni,
nia stelo estos
hela rando de la aŭroro.

Walizka

Rano Kraków był pochmurny, dymiły wzgórza.
W Monachium padał deszcz, Alpy niewidoczne
i ciężkie leżały w dolinach jak kamienie.

Dopiero w Atenach zobaczyłem słońce, które
sprawiło, że powietrze, całe powietrze,
cała ogromna flotylla powietrza,
zamieniło się w drżące złoto.

Jak mówią pisarze religijni: nagle
stałem się innym człowiekiem.

Jestem tylko turystą w widzialnym świecie,
jednym z tysiąca cieni, które
snują się w ogromnych halach lotnisk –

a za mną jak wierny pies
jedzie na małych kółkach
moja zielona walizka.

Jestem tylko nieuważnym turystą,
ale kocham światło.

Valizo

Matene Krakovo estis nubkovrita, fumis montetoj.
En Munkeno pluvis, Alpoj nevideblaj
kaj pejzaĝoj kuŝis en valoj kiel ŝtonoj.

Ĝus en Ateno mi ekvidis la sunon, kiu
kaŭzis, ke la aero, tuta aero,
tuta ega flotilo aera
ŝanĝiĝis en tremantan oron.

Kiel diras verkistoj religiaj: subite
mi fariĝis alia homo.

Mi estas nur turisto en la videbla mondo,
unu el miloj da ombroj, kiuj
vagas en egaj haloj de flughavenoj –

kaj post mi kiel fidela hundo
veturas sur malgrandaj radetoj
mia verda valizo.

Mi estas nur la malatentema turisto,
sed amas lumon.

Forpasis nia amiko kaj apoganto

Stanisław DZIEDZIC naskiĝis en la j.1953, en Dąbrowa apud Resovio. Li studis polan filologion en Jagelona Universitato i.a. ĉe Maria Dłuska kaj Kazimierz Wyka. En la j. 1978 li fariĝis diplomito de filologio kaj de ĵurnalismo. Post la studado li laboris en Krakovo kiel lekcianto pri kulturo kaj okupiĝis pri la pola literaturo publikigante librojn kaj artikolojn. En la j. 2015 li doktoriĝis en Jagelona Universitato surbaze de disertacio pri fruaj poemoj de Johano Paŭlo la Dua kaj eldonis ĝin libroforme s.t. La dia romantikulo.

Jam de junaj jaroj li interesiĝis pri aŭtonomia agado apartenante al Konsilantaro de Studenta Domo "Żaczek". En la j.1989 – 2016 li plenumis gravajn administrajn funkciojn en Krakova Urba Oficejo, antaŭ ĉio kiel direktoro de Departamento pri Kulturo kaj Nacia Heredaĵo. Intertempe li laboris en Krakova Pola Radio kaj en SKOZK – Socia Komitato pri Renovigo de Historiaj Restaĵoj.

De la j. 2016 li estis direktoro de Biblioteko - Krakovo. Inter alie li okupiĝis pri la dua eldono de Krakova Enciklopedio kaj pri serio de valoraj krakovaj poetoj.

Tre popularaj de la jaro 2004 estas diversaj "krakovaj kulturaj noktoj": ekz. de Muzeoj, de Poezio, de Teatroj, de Danco, de Ĵazo. La pripenso de ili ankaŭ devenas de Stanisław Dziedzic.

Kiel direktoro de Departamento pri Kulturo kaj Nacia Heredaĵo ĉe Krakova Urba Oficejo li sendube apogis agadon de Krakova Societo Esperanto monhelpante al ni dum multaj esperantaj aranĝoj. Kun tristo ni adiaŭas nian amikon kaj apoganton, kiu mortis 8. 04.2021 pro la kronviruso.

Anoj de Krakova Societo Esperanto

Stanisław Dziedzic

La romantikulo Dia. Karol Wojtyła – poeto.

„La pola penso ĉiam volonte serĉis literaturajn formojn de la transdono. La plej grandaj niaj pensuloj estis verkistoj, poetoj, prozistoj, intrig-rakontantoj, eseistoj, aŭtoroj de kritik-literaturaj libroj kaj publicistoj [...] ne hazarde la plej grandaj polaj mistikuloj estas poetoj: Beniśławska, Mickiewicz, Słowacki, elstara noviganto pri teologio estis Norwid, fruntaj politikaj pensuloj restis Moch-nacki, Krasiński, Brzozowski. Kaj inverse la movo simila – la plej elstaraj filozofoj okupiĝas pri literaturo” – rimarkas Krzysztof Dybciak kaj informas pri multaj, nuntempaj polaj filozofoj-literaturistoj. Kaj iliaj nomoj estas konataj – i.a. Tadeusz Kotarbiński, Florian Znaniecki, Leszek Kołakowski, pastro Józef Tischner, finfine Karol Wojtyła – „homo destinita por verki metitajn lirikaĵojn kiel nemultaj: filozofo kunliganta interesiĝon pri verkoj de mistikuloj kun aplikado de filozofio aga, teologo direktita al etiko kaj personismo kaj ekleziologo.”

Se tamen en menciitaj kazoj historiistoj pri literaturo aŭ kritikistoj, de tempo al tempo ankaŭ ilin priskribadis, pri tiu specifa sinkretismo scienca kaj literatura, rilate al Karol Wojtyła krom tre mallarĝa aro de personoj estantaj atestantoj de iliaj literaturaj aperaĵoj – oni ne sciis.

Pli multaj personoj, precipe el lokoj, en kiuj vivis Karol Wojtyła – Wadowice kaj Krakovo sciis pri liaj ligoj kun teatro, sed ankaŭ tiu tempo de la artista agado de la venonta papo estis nek ko-nata pli proksime, nek science prilaborita. Certaj literaturaj verkaĵoj de Karol Wojtyła estis presitaj en „Tygodnik Powszechny” kaj „Znak”, sed sub pseŭdonomoj, do – krom areto de plej proksimaj konatoj la aŭtoro ne estis konata al la legantaro. Konforme al pli kaj pli altaj ekleziaj postenoj la interesiĝo pri persono de la aŭtoro, pri lia agado, ankaŭ tiu trapaŝanta devojn, grave pligrandiĝadis. Sur scenejo de la pola literaturo, sur kolumnoj de la menciitaj katolikaj periodaĵoj aperis tridekjara aŭtoro subskribita Andrzej Jawień, „la preta poeto”, kiu havas la propran artistan lingvon kaj indivi-duajn viziojn kaj ideon pri la literatura verkado. En „Tygodnik Powszechny” ekde 1950 jaro li publi-kigis tri poemojn (Kanto pri brilo de l' akvo, Patrino, Penso estas spaco stranga)

kaj post la deviga paŭzo en eldonado de gazeto, kiam en 1957 oni rekomencis la agadon – pluajn verkojn – i.a. poe-mon Profiloj de Cirenano. De la 1957 jaro nomo de Jawień estos konata al legantoj de la monata re-vuo „Znak”, en kiu aperis i.a. poemo Ŝtonminejo kaj dramo Antaŭ butiko de juvelisto. Certaj verkoj estis subskribitaj nur per dulitera kriptonomo AJ (Naskiĝo de konfesantoj, Eklezio {fragmentoj}, Meditadoj pri patreco, Migrado al lokoj sanktaj, Paska vigilio). Nur malmultaj konjektis aŭ sciis, ke kelkaj verkoj de Stanislaw Andrzej Gruda, kiujn publikigis „Znak” (Pensante Patrujo, Meditado pri morto, Redempto serĉas Vian formon, Radiado de patreco) estas efektiviĝoj de la sama aŭtoro, kiu utiligas du pseŭdonomojn kaj kriptonomon.

En 1978 jaro – precize kvardek jarojn ekde la poezia debuto Karol Wojtyła estis elektita al la Sankta Seĝo. Konata ĝis nun al nemultaj kaj de nemultaj kunigata kun persono de la krakova klerariulo la literatura verkado estis montrita al la mondo. Publikigita laŭ konsento de Johano Paŭlo la Dua en Eldonejo „Znak” verko „Poeziaĵoj kaj dramoj”, Krakovo 1980 (elekto de J. Turowicz kaj Marek Skwarnicki, filologia prilaboro de Jan Okoń) igis multajn spekulojn. Simile oni reagis antaŭe je la teatraĵoj. La tuta literatura akiraĵo de la papo fariĝis nun objekto de interesiĝo kaj temo de esploroj. En historio de Eklezio konataj estas kazoj de verkantaj elstaruloj. Karol Wojtyła, iam literaturisto kaj aktoro, interesis precipe ĵurnalistojn, pro liaj elektoj – inter stato de artisto kaj pastreco. Esenca ankaŭ fariĝis rilato de aŭtoro al la propra verko.

En la komenca vorto al antologio de la pastra poezio "Vortoj sur dezerto" (Londono, 1971) kardinalo Karol Wojtyła skribis i.a.: "Pastreco estas sakramento kaj vokiĝo. La poezia verko estas funkcio de talento – sed talentoj ankaŭ decidas pri la vokiĝo, almenaŭ en la subjekto senco. Oni povas do demandi: kiamaniere ĉi du vokiĝoj pastra kaj poezia kunekzistas, kiamaniere ili trapenetriĝas en la sama homo? Tia demando rilatas ion pli multan ol verkoj. Ĝi rilatas aŭtorojn, koncernas aferon, kiu estas ia sekreto de ĉiu el ili.

Aferoj ligitaj kun la pastra vokiĝo kaj literatura verko penetris la aŭtoron – poeton kaj dramverkiston. En la aŭtobiografia libro "Donaco kaj sekreto" skribita dum la kvindekaj datreveno de la pastro-konsekreco implicas tre personajn konfesojn ligitajn kun elekto de filologiaj studoj, artistaj planoj – literaturaj kaj teatraj, kaj ankaŭ kun decido pri pastreco. Kaj rezulte pri trapenetrado de la pastra vokiĝo kaj de literaturo en vivo de Karol Wojtyła. Li mem estis ĉiam tre modera ĉe agnosko de sia literatura aktiveco en kategorioj ĝuste porliteraturaj. Legado de maturaj verkoj de K. Wojtyła igas supozon, ke ili estis ĝuste Lia "laboratorio" de la koro, imago kaj meso samtempe, en kiu Li "provis" tion, kion alimaniere oni ne esprimos: misteron de la homa amo, Eklezio, patrineco kaj pat-reco, de la homa morto, sed ankaŭ misteron de la monta torento kaj de ŝtonoj [...]. Ĉefe ĝi estas poe-zio kontempla, kaj brilo lumiganta ĝian enon havas la mistikan fonton. Se ni tion ne ekkomprenos, ni ekstaros nur sur ĝia sojlo."

La artistaj agoj de Karol Wojtyła estas profunde enskribitaj en lian biografion, sistemon de valoroj, estas registro de la esencaj meditoj, finfine vojo, laŭ kiu li deziris serĉi kaj trovi Dion kaj homon, ekkoni la bazajn problemojn de homo disŝirita inter *sacrum* kaj *profanum*. Survoje al tiuj serĉoj li renkontis multe da homoj, kies personecoj kaj verkoj potence influis al formado de la personeco kaj direktoj de artistaj serĉoj de Karol Wojtyła. Ili estis i.a. grandaj reprezentantoj de la pola literaturo, precipe romantisma kaj modernisma, viziuloj kaj artistoj de la pola teatro – Juliusz Osterwa kaj Mieczysław Kotlarczyk. Sed estis inter ili ankaŭ "la princo hardnuka" – metropolito krakova Adam Sapieha, mistikulo el kvartalo Dębniki Jan Tyranowski, finfine personoj, kiujn pro la kronologio li ne povis ekkoni, sed kiuj scipovis lin fascini – frato Adam Chmielowski aŭ karmelitaj mistikuloj de antaŭ kelkaj jarcentoj – Sankta Johano de la Kruco kaj Sankta Tereza el Avila. Al junecaj direktoj de interesiĝoj de Karol Wojtyła influis ankaŭ la patro, la frato, gimnaziaj profesoroj, animigantoj de kulturo el la gepatra Wadowice.

Elekto studi la polan filologion ĉe interesiĝoj pri literaturo kaj teatro ne konsternis, kvankam certaj prognozis elekton de teologio. Konjektojn kaj spekulojn klarigis post jaroj Johano Paŭlo la Dua mem konstatante i.a.: "Se juna homo kun tiel klaraj emoj religiaj ne elektis seminarion, tio povis naski konjekton, ke ĉi tie rolas afero de iuj aliaj emoj aŭ plaĉoj [...]. En tiu tempo-periodo ŝajnis decida inklino al literaturo, precipe al dramo kaj teatro [...]. Mi deziras substreki, ke mia elekto de pola filologio estis motivita per klara emo studi literaturon. [...] Tio enkondukis min en tute novajn dimensiojn, por ne diri en mistero de la vorto [...]. Malkovrante vorton trans literaturaj kaj lingvistikaj studoj mi ne povis ne alproksimiĝi al mistero de Vorto [...]. Pli malfrue mi ekkomprenis, ke tiuj studoj pretigis en mi grundoj sub aliajn direktojn de studado: mi pensas pri filozofio kaj teologio."

Du semajnojn post komenco de pol-filologiaj studoj (15.10.1938) Karol Wojtyła oficiale debutis kiel poeto en Blua Salono de Katolika Domo en Krakovo per "Beskidaj baladoj". Jam de

junaĝaj poemoj, en kiuj ravita pro belo de Beskidoj kaj Krakovo aŭtoro utiligis romantismajn kaj modernismajn poezi-rimedojn – esence li verkis proprajn forte individualigitajn lirikaĵojn, fiksitajn en volumo "Psalmaro, Slava Libreĝo", kaj en la venonta jaro dramojn: Davido, Ijobo kaj Jeremio.

Poezio de Karol Wojtyła dekomence estis konsekvenca poezio religia frapanta pro riĉeco de penso kaj vasteco de la kulturaj inspiroj. Dekomence ĝi diferenciĝis de la tradicia, pli sentema kaj devota ol intelekta pola poezio religia. Raviĝo super poezio de Sankta Johano de la Kruco inspiris unu el la plej belaj poemoj de Karol Wojtyła – "Kanto pri Dio kaŝita", kiu aperis en „Głos Karmelu”, en 1946 jaro.

De 1950 jaro Karol Wojtyła realiĝis plej ofte en formo de la refleksiaj poeziaĵoj, spece proksimaj al meditadoj kaj traktatoj. En koncepto de subjekto parolanta oni vidas influon de la filozofia vidpunkto, kiun oni povas nomi aktiva personismo (i.a. en libro de la aŭtoro Persono kaj ago). Kelkaj verkoj (i.a. Kanto pri brilo de l' akvo, Penso estas spaco stranga) alportas la poezian ateston mistike ekkoni Dion, en aliaj dominas esploroj pri etiko kaj ekzisto (Meditado pri morto). De kvindekaj jaroj homo en poemoj de Karol Wojtyła aperas en ĉiuj dimensioj de sia historia esto. En poeziaj cikloj Stonminejo (1956), Profiloj de Cirenano (1958), Naskiĝo de konfesantoj (1961), Eklezio (1962), Migrado al lokoj sanktaj (1965), Paska vigilio (1966) aŭ Pensante Patrujo (1974) oni montris homon en perspektivo de historioj pola kaj monda, provitan per ĉiutagaj baraktoj, riĉan pro donaco de amo kaj mizerikordo Dia. En tiuj verkoj la aŭtoro ampleksis ne nur proprajn, profundajn pripensojn filozofiajn kaj teologiajn vidpunktojn, sed ankaŭ proprajn vivspertojn: lokojn en kiuj li laboris, al kiuj migris kaj pilgrimis kaj kiuj formadis lian personecon kaj sistemon de valoroj.

Specialan lokon en verkado de Karol Wojtyła okupas ĉi lasta verko, kiu ekestis antaŭ la memorinda konkklavo. La aŭtoro oferis ĝin al sia sekvanto en krakova kurio – ĉefepiskopo Franciszek Macharski. La poemo tekstas pri du racioj formantaj historion de Pollando, de kiuj la unua apogas je glavo, la dua je Vorto. Du tragediaj herooj: reĝo Boleslao kaj episkopo Stanislao formas identecon de la patrujo – "tero de malfacila unueco, tero de homoj serĉantaj proprajn vojojn", en kiu gesto de sango kaj gesto de Vorto formas unuecon. Jen la provo explore sondi la polan historion kaj trapenetri homajn raciojn krei tradicion kaj identecon. Ĉu la poemo kontinuas la junecan rilaton al racioj de la Reĝo kaj de la Episkopo, kun kiuj la aŭtoro luktis kiel aktoro dum spektaklo de Reĝo Spirito en krakova Rapsoda Teatro?

Literaturajn valorojn enhavas ankaŭ verkoj el aliaj kampoj de la verkista agado, precipe predikado. Kvankam ĝenerale oni certigis, ke Johano Paŭlo ĉesis literature aktivi, en eldiraĵoj, en papaj preĝoj oni povis rimarki tre individuan pensadon laŭ literaturaj kategorioj (ekz. fama "Preĝo al la Plej Sankta Virgino el Guadalupe", aŭ trapenetranta, lirika kaj plena de fido "Preĝo al Dipatrino el Kalwaria", eldirita de Johano Paŭlo la Dua en la kalvaria sanktejo). Post 25 jaroj de la pontifikeco la papo publikigis verkon, kiu kontinuas pli fruajn. "La Roma Triptiko" kun subtitolo "Meditoj" post-restas nenian dubon pri la poezia karaktero.

"Mirinde estas tamen, ke post tiel longa paŭzo "La Roma Triptiko" konservas ĉiujn ecojn de poezio de la Aŭtoro kaj kondukas la bazajn direktojn de Lia verko al la specifa apogeo [...] La gvida penso de Triptiko – kiel en la verkoj antaŭaj estas la spirita vojo de la homo al Dio trans la Redempto. Gvidfadenoj, sur kiuj la poeto varpis apartajn partojn estas: naturo, arto kaj la Sankta Skribo"

"La Roma Triptiko" ekestis aŭtune 2002 jaro, kelkajn monatojn post publikigo en „Tygodnik Powszechny” Teologian traktaton de Czesław Miłosz. Kvankam ambaŭ verkoj ne intencis kaj celis la interdependon, la komunaj punktoj de ĉi poemoj ŝajnas evidentaj, reciproke sin kompletigas.

La influo de Mickiewicz kaj Norwid al Johano Paŭlo la Dua estas evidenta kaj klara, tial Czesław Miłosz nomis liajn enciklikojn de la lasta pola romantikulo". Li konfirmis ĉi vortojn kaj konstatojn publike, en Krakova Salono de la arkiepiskopa palaco, komence de 2003 jaro. Tiun tagon, je la sama horo, en Vatikano kaj en Krakovo oni prezentis "La Roman Triptikon". Partoprenanta en tiu senprecedenca okazintaĵo en la krakova, arkiepiskopa rezidejo Czesław Miłosz konstatis, ke poeto-filozofa scipovas en la literatura traktato ampleksi enhavon de portipovo ne malpli granda ol sciencisto en vasta disertacio – rezulto de longaj kaj ĝisfundaj esploroj. La grandaĝa nobelpremiito emfaze substrekis, ke ĉi celon atingas en Triptiko helpe de la poeziaj vorto kaj metaforo, helpe de retoriko kaj preciza argumentado – Karol Wojtyła, Johano Paŭlo la Dua.

tradukis Lidia Ligeza

La Roma Triptiko estis esperantigita de Lidia Ligeza kaj eldonita en Krakovo, en la jaro 2006.